Boulogne sur Mer
31, boulevard Mariette
la 10an de Aprilo 1923

Kara Samideano,

Ŝajnas ke mi sekvas vian ekzemplon + komencas prokrasti ankaŭ. Sed, mi faras tion iom vole por ke vi mem ne estu enuigita de via propra prokrasto kutima. Ĉu ne estas vera argumento de advokato?

Dankon grandan por via letero de la 8a de la pasinta. Ĉiam mi legas vin kun la sama plezuro, same kiel mi ankaŭ de nove revidos vin en Nürnberg se mi iros.

La situacio tute ne ŝajnas plibonigi + ĉiuj tie-ĉi konsilas al ni ne iri Bavarujon. Mi povus kredigi ke mi estas Anglanino sed mia edzo, neniam, ĉar li ne parolas sufiĉe flue + havas elparolon francan.

Ni povus iri kun la Rejna karavano de Koblenz ĝis N. Sed, private, en hotelo, k.t.p. oni povus esti tre malagrabla kun mi, ĉu ne. La estonteco montros. Sed mi deziras iri multege. Mi vidis niajn nomojn hodiaŭ en E.T.[1] Francoj estas malmultaj – nur ses, mi kredas !!! Mia edzo jam skribis al Teo Jung pri lia ĵurnalo. Ŝajnas ke oni enuas lin, malfeliĉa redaktoro!

Mi esperas ke vi ĝuis vian radiatelefonan koncerton. Tie-ĉi sufiĉe multaj privataj domoj havas la aparaton. Kostas nur 1 000 frankojn. Mia edzo volas havi ĝin + mi ne ŝatus. Ili ne estas ĉiam tre helaj + mi ne bezonas alian komplikaĵon en mia vivo. La domo estas sufiĉe granda, la ĉiu tagaj bezonoj ĉiam pligrandiĝas ke mi ne deziras havi alian okupon. En Anglujo, oni povas havi ĝin po 1 funto, sed ne tre bona.

Mi sendis P.K.[2] en Paskaj tagoj al vi en "le Touquet-Paris-Plage". Belega loko, je unu horo 1/2 de tie-ĉi, en automobilo[3]. Ni restadis tie 5 tagojn + ĝuis belegan varman veteron. Estas moda marbanejo en arbaroj de pinoj. Belegaj hoteloj, golfo, tenisejoj, k.t.p. Luksaj malgrandaj magazenoj, belegaj tualetoj, Eleganteco ĉie. Ne plu estis unu ĉambro – ĉiuj estis luitaj. Tre konataj, famaj personoj el Parizo + Londono ĉeestis. Ni, tage, legis en la arbaroj solaj aŭ sidis apud la maro + vespere, iris Kasinon danci aŭ rigardi ludi (por mono, kiel en Monte Carlo aŭ Ostende aŭ en Boulogne s/M).

Nun, la vetero ŝanĝiĝis + mi devis de nove eklumigi nian hejtaparaton (chauffage central) pro la nekutima malvarmo; +4° centigrade.

Vi parolas pri flageto subskribita de ni en angulo de via kancelario + donita al vi. Sed mi nur memoros[4] flageton aĉetitan de mia edzo por via edzino. Ĉu estas tiu?

Teniso komencis antaŭ 8 tagoj – mi ne ludis sed mia edzo iam ludis 3 foje. Sed li estas tiel okupata.

Ĉu vi vidis filmon: "Nanouk" ? Tre interesa! Estas ĉe "la Esquimaux" ĉe la norda Poluso, preskaŭ, prenita en 50° sub 0° centigr. Ne estas historio sed nur la vivo de tiuj primitivaj homoj en tiuj malvarmaj landoj. Ili estas kiel bestoj. Belega filmo.

Dankon al vi ĉar vi oferis havigi sciigojn pri Podkarpatska Rus[5] - sed mi ne deziras, ĉar mi kredas ke la korespondado inter Varszaly + mi ne daŭros longe. Mi respondis al liaj demandoj sed sendube mi senkuraĝigis lin, ĉar li ne plu skribis. Estas vere ke li jam restis 2 jarojn same sen skribi. Via samlandano Sro. Sibrava el Znojmo ankaŭ ĉesis – li trovis ĉiam pretekston pro laboro k.t.p. Nature, mi ne plu skribas ankaŭ. Sed, li iras al Nürenbergo. Li estas sekretario de socialista partio politika – mi kredas ke estas socialisto sed li neniam precizis.

Ankoraŭ du samlandanoj viaj ĉesis. Tout passe, tout casse, tout lasse – ĉu ne? Precipe en Tcheco-Slovaquie.

---

1 Esperanto Triumfonta
2 poŝtkarton
3 aŭtomobilo
4 memoras
5 **Noto de Alice marĝene:** Kial vi skribis "La Russie Soucarpathique ? France ? Mi tute ne komprenas.

Entuziasmo unua, sekve forgeso! Mi komprenas tion tre bone, estas tre homa! Tamen iom da entuziasmo, da idealeco estas necesaj al kelkaj personoj!!!

Mi esperas ke Dro. Leono Zamenhof ĉeestos la Kongreson – sed tiel ofte li estis malhelpita veni lasta momente. Mi ne vidis lin de multaj jaroj + li ŝajnas laŭ fotografaĵoj tre tre maljunigita. La filino (Dro Sofio Zamenhof) de nia Majstro venos. Mi bone konas ŝin. Mi estis kun vi kiam Sino Z. diris al mi pri ŝia vivado + pri la sinmortigo de nia amiko Dro Alek. Zamenhof. Mi tiel bone rememoras mian fortan emocion.

Nun, kara Samideano, mi petas vin saluti vian edzinon + kisi vian Eveton kiu devas esti nune tiel interesa.

Amikajn salutojn de mia edzo + Tre sincere + samidealane
via Acie Sergeant

Ĉu vi rimarkis ke sur leterkoverto mi ĉiafoje
skribas vian landon france – vi diris al mi ke
mi antaŭe skribis Česko-Slovenska, ke tio estas
malbona – sed vi ne diris al mi kiel mi devas skribi ĝin – korekte.